Eŭropa Bulteno

Marto 2020, Numero 201

# ALVOKO AL EŬROPA KAJ TUTTERA SOLIDARECO



En Eŭropo ni dum lastaj semajnoj atestas okazadojn kiuj ĝis nun ne ekzistis kaj starigas antaŭ nin komplete novajn defiojn. Dum la homoj malrapide konstruas novan realecon de sia ĉiutago, la ŝtatoj enkondukis klasikan manieron defendi sin kontraŭ klasikaj malamikoj – sekurigi siajn landlimojn. Malgraŭ tio ke la viruso estas ĉio alia ol klasika malamiko, la landlimoj antaŭ niaj okuloj denove kreskis kun rapideco, pri kiu eĉ la plej ekstremaj naciistoj povis nur sonĝi. Nun kiam estas sendube la fakto ke por haltigi la viruson estas necese limigi la moviĝadon de homoj, ni devas ankoraŭ demandi nin kion tiu reago signifos por morgaŭ? Nuntempe sendube unualoke troviĝas vivoj kaj ekzistado de la homoj. Sed ni ne rajtas permesi ke ni ne starigu tuttempe ankaŭ demandojn ligitajn kun iom pri posta estonto. Kia estos Slovenio kaj kia estos Eŭropo, kiam ni sukcesos venki la viruson?

Eŭropa Unio eliris el la krizo de la dua mondmilito kaj por siaj valoroj alprenis solidarecon kaj homajn rajtojn. Ĝuste tiuj valoroj estas dum tiuj ĉi tagoj en la plej granda danĝero ĝis nun.

Kio restos el la solidareco kiam la ŝtatoj batalas por la ŝirmekipaĵoj kaj oni tute ne konsideras kiu ilin fakte en la konkreta momento plej bezonas. Iuj ŝtatoj kulpigas Germanion ke ĝi ne permesas eksporton de ŝirmmaskoj, Germanio kulpigas Francion ke ĝi mem ne povas akiri ilin dum Italio petas pri helpo, kiu ne venas el Eŭropo sed el Ĉinio. (Tiurilate oni memoru tiujn kiuj ankoraŭ antaŭ nelonge laŭte skandaliĝis pri eventuala helpo por Ĉinio kaj tuj post kiam venis unuaj pakoj el Ĉinio, silentiĝis). Entute dum la lastaj semajnoj ŝajnis ke ni reiris en la tempo kaj ni estas denove nur ŝtatanoj de siaj landoj kaj ke reeĥo de la Eŭropa politiko ne estas sentebla.

Nur en la lastaj tagoj la Eŭropa Komisiono fine vekiĝis kaj komencis akcepti tre bezonatajn decidojn por la tuta komunaĵo. Sed la plej necesa movo estos pruvi ke Eŭropo kapablas esti solidara inter la membroj-ŝtatoj. Ke la ŝtatoj kiuj ke travivas la plej fortajn aspektojn de la krizo helpas al tiuj kiuj estas plej trafitaj kaj ke ili scias ke la aliaj, kiam ili mem troviĝos en simila situacio helpos al ili. Eŭropa Unio devas respondi alimaniere kaj ne lasi la plej problemajn ŝtatojn esti senhelpe solaj. Nur tiel la eŭropa ideo povos gardi sian integrecon.

Alia demando estas demando de homaj rajtoj. Ĝuste ĝi grave lamigis kaj malrapidigis ĝis certa grado eŭropan respondon kompare kun la ĉina, ja la ŝtatoj kiuj dum jardekoj konstruadas siajn strukturojn de demokratio, estas esence pli atentemaj rilate enkondukon de eksterordaj mezuroj kiuj povus endanĝerigi la atigitajn rajtojn de civitanoj (eble ankaŭ tie oni devus serĉi kaŭzojn por esence pli malrapida reago de ŝtatoj kiel Germanio, Francio aŭ Nederlando kompare kun Slovakio, Kroatio aŭ Slovenio). Kontrolo per dronoj en Hispanio aŭ sekvado de movado de telefonoj en Italio estas pintoj de mezuroj kiuj ankoraŭ en januaro kiam ni observis la okzadojn en Ĉinio, ŝajnis absurdaj kaj por Eŭropo tute ne adekvataj. Sed demokration kaj homajn rajtojn ni ne rajtas observi kiel baro al sekureco, sed kiel potencon kaj avantaĝon de nia komunaĵo. Tial en la tempo kiam ni provizore kaj grandparte propravole forŝovis grandan nombron de niaj rajtoj, kvalita kaj fundamentita informado havas egan signifon por ŝtatanoj kiuj devas la decidojn de la regantoj kompreni kaj akcepti. Tio por la demokratio havas eksterordinaran signifon. Malrapide ni denove akcepetas kian signifon havas informrimedoj kaj ke la sociaj retoj ne povas ilin anstataŭi. Estas rimarkinde ke la homoj ĉie en Eŭropo en tiuj ĉi tagoj revenas al klasikaj informrimedoj kiuj estas la nuraj kapablaj oferti kontrolitajn informojn. Ĉiuj provoj kiel ajn limigi la informrimedojn estas nun neakcepteblaj. Ankaŭ ĉi tie harmoniigita reeĥo de Eŭropa Unio povus forpreni iom da necerteco en ŝtatoj, kie strukturoj de la kontrolo de demokratiaj mekanismoj ne estas firmaj kiel en aliaj ŝtatoj.

La stato en kiu ni nun troviĝas ne estas limigita al Eŭropo. Ĉiuj ŝtatoj nuntempe batalas kontraŭ la viruso kaj morgaŭ ĉiuj batalos kun ties sekvoj en ekonomio kaj socio ĝenerale. Bedaŭrinde en la mondo troviĝas neniu kiu pretus transpreni la bridojn en siajn manojn kaj starigi ion kio almenaŭ similus al tutmonda solidareco. Irano restis kun siaj problemoj sola kaj kio okazos kiam la viruso disvastiĝos en Gazo, en Sirio aŭ Bangladeŝo? Jam nun la fabrikoj kiuj produktas niajn vestaĵojn, telefonojn, ludilojn kaj aliajn gravajn produktojn por la konsumisma mondo ĉesis funkcii ĉar la importantoj retiris siajn mendojn. Kiom longe tiuj laboristoj eltenos sen labori? Ĉu ni havas ian ajn respondecon por ili kiel uzantoj de iliaj servoj, eĉ se ili vivas aliparte de la mondo? Kaj ne malgrave, kien tiuj laboristoj iros kiam la stato ankaŭ en iliaj landoj fariĝos neeltenebla? Ankaŭ ĉi tie ni atendas ke Eŭropa Unio agos por la bono de ĉiuj kaj decidos pri agoj kiuj fortigos tutmondan solidarecon.

Tial ni invitas Eŭropan Komisionon kaj eŭropajn parlamentanojn ke ili aktive porbatalu la valorojn, kiujn EU mem starigis por si kiel fundamenton por sia agado kion ni – civitanoj

atendas de ili. Landlimojn ni ne povos fermi por ĉiam, ankoraŭ pli malfacile ni povos fermi ilin netralaseblaj. La viruso pri tio tute ne zorgas. Ni pensu nur pri la nehaltigebla disvastiĝado de pesto en la tempo kiam la mondo estis multe malpli interligita ol ĝi estas nun. Tial ni devas pensi tutglobe kaj kune. Ni devas pensi solidare kaj sobre. Ni invitas Eŭropan Union, reagi je maniero kiu fortigos interligiĝon inter sciencistoj, ŝtatanoj kaj ŝtatoj. En tiuj ĉi tempoj de krizo ĝi reagu solidare kaj kun granda respondeco por la estonto. Tiukaze ni povos ĉiuj kune pli facilkore rigardi al la morgaŭaj tagoj.

Maja Cimerman Sitar
Prezidantino de Asocio por Eŭropa Konscio (Maribor)

*Maja Cimerman Sitar estas prezidantino de Asocio por Eŭropa Konscio (kun sidejo en Maribor, Slovenio) kies celo estas pere de diversaj eventoj oferti pripenson pri la signifo de Eŭropa Unio kaj ties historio kaj interplektiĝon de la vivoj de ties civitanoj. Ŝi diplomigis pri biologia antropologio en Universitato de Vieno. Ŝi laboras en la kampo de evoluigo de libere atingeblaj fontoj por edukado, antaŭ ĉio sur la kampo le lernado de lingvoj kaj interkultura interkompreniĝado. Ŝi agis kiel redaktorino de pluraj instruportaloj, inkluzive de EEU-kunordigita lingvo.info. Ŝi verkas por infanoj. Ŝi estas aŭtorino de infanromano Hiša spominov (Domo de rememoroj), pluraj mallongaj rakontoj kaj tekstoj, kaj de e-libro por plurlingvaj infanoj Kuarki – popotnik med svetovi (Kuarki – vojaĝanto inter la mondoj) kiu estas libere legebla kiel aplikaĵo en 9 lingvoj.*

## NOVA INFORMA KAJ INSTRUA PROJEKTO EN LITOVIO

Komence de 2020 en Litovio startis nova informa kaj instrŭa projekto pri Esperanto. Temas pri komuna projekto de Litova Esperanto-Asocio kaj populara litovlingva novaĵretejo „Mano kraštas“ (Mia lando). La projekto konsistas el du partoj:

1. En la novaĵretejo regule minimume unufoje semajne estas publikigataj retaj lecionoj de Esperanto. Lecionojn faras vicprezidanto de Litova Esperanto-Asocio konata Esperanto-instruistino Gražina Opulskienė kaj ne malpli konata esperantistino Aida Čižikaitė
2. En la novaĵretejo ankaŭ konstante kaj regule aperas diversa informa materialo pri Esperanto, pri agado de esperantistoj en Litovio kaj eksterlande k.s.

En la menuo de la novaĵretejo estas kreita speciala rubriko de Litova Esperanto-Asocio. La adreso estas https://www.manokrastas.lt/page/lietuvos-esperantininku-sajunga. Por hodiaŭa tago en ĝi jam aperis 11 lecionoj de Esperanto kaj 28 intervjuoj kun litovaj esperantistoj el 12 urboj de Litovio. Kutime aperas po 2-3 intervjuoj inter la lecionoj. Esperantistoj libere respondas al jenaj demandoj de la redakcio:

1. Kiam kaj kiel Vi ekinteresiĝis pri Esperanto? Kiu estis tiu la unua instruisto, kiu helpis al vi fari la unuajn paŝojn en lernado de Esperanto? Respondantoj kutime respondas, kiel kaj kial ili fariĝis esperantistoj.
2. Kiel Esperanto utilas por vi? Kiajn eblecojn ĝi malfermis al vi? Ĉu Esperanto por vi estas hobio aŭ ebleco akiri novajn sciojn aŭ eble ankoraŭ io?
3. Eble vi partoprenas en agado de Litova Esperanto-Asocio? Kiel? Kiaj aranĝoj kaj renkontiĝoj estas por vi la plej interesaj?
4. Kiu frazo en Esperanto estas por vi la plej bela? Kion ĝi signifas?

Multe pli vasta enkonduka intervjuo pri Esperanto kaj pri la projekto estas publikigita kun Povilas Jegorovas. Ĉiusemajne tiu kvanto de publikaĵoj kreskas.



### 12-a leciono (pamoka)

**MAŽEIKIAI** 2020 M. BALANDŽIO MĖN. 2 D.

Saluton karaj! Ĉu vi preferas loĝi en urbo aŭ en vilaĝo? Naujų žodžių apie miestą galite išmokti ...



### Valė Pisaravičienė: mokytis esperanto kalbos paskatino netikėta pažintis

**ALYTUS** 2020 M. KOVO MĖN. 31 D.

Sena tiesa: už kiekvieno, iš pirmo žvilgsnio atsitiktinio įvykio, slepiasi vienoks ar kitoks gyvenimo posūkis. „Prieš dvylika metų ilsėdamasi Palangoje per draugus susipažinau su esperantininku Kastyčiu Aleknavičiumi. Jis pradėjo pasakoti apie esperanto ...

Litova Esperanto-Asocio kunlaboras kun novaĵretejo „Mano kraštas“ jam dum kelkaj jaroj. Pro tio en la rubrikon estas metitaj ankaŭ ĉiuj aliaj (entute 8) ampleksaj artikoloj pri Esperanto-movado aperigitaj en tiu novaĵretejo dum 2018-2019. Tiamaniere jam nun eblas legi 47 publikaĵojn.

Krome, tiu reta ebleco lerni Esperanton estis multe reklamita en aliaj novaĵretejoj. Anoncoj pri tio aperis en jenaj lokoj:

1. En novaĵretejo de Litoviaj sciencistoj „Mokslo Lietuva“ (Scienca Litovio): http://mokslolietuva.lt/2020/01/kvietimas-mokytis-esperanto-kalbos/
2. En novaĵretejo pri edukado „Švietimo naŭjienos“ (Novaĵoj de edukado): http://www.svietimonaujienos.lt/lietuvos-esperantininku-sajunga-kviecia-mokytis-esperanto-kalbos/
3. En novaĵretejo de Litovia ĵurnalista asocio: http://www.lzs.lt/lt/naujienos/skelbimai/kvieciame_mokytis_esperanto_kalbos_per_interneta.html
4. En novaĵretejo de ĵurnalistoj de Kaunas: http://www.kaunozurnalistai.lt/53377/

Krom tio, artikolo pri tiu ebleco lerni Esperanton aperis en novaĵretejo de Litovia nacia asocio de la universitatoj de la tria aĝo: http://www.tauasociacija.lt/kvieciame-senjorus-mokytis-esperanto-kalbos.

Novaĵretejo „Mano kraštas“ estas unu el dekkelkaj, kun kiuj Litova Esperanto-Asocio kunlaboras. Kutime, en preskaŭ ĉiuj el ili konstante kelkfoje jare aperas gravaj artikoloj pri Esperanto-movado en Litovio. Nuna projekto tiun informadon faras multe pli regula kaj stabila. Krome, ebleco lerni Esperanton rete en litova lingvo multe pli valorigas la projekton. Laŭ mi, tiu projekto estas unika en la mondo.

Povilas Jegorovas

# REAGO AL LA ARTIKOLO „KIE ESTAS DUOLINGANOJ?“ EN LIBERA FOLIO




La vera esperantisto iĝas nur kiam li renkontiĝas kun alia viva esperantisto. Lingvo estas komunikilo inter almenaŭ du homoj, sed ne kun si mem. Oni devas laŭeble frue havi aktivan sperton komuniki kun aliaj. Tiusence sufiĉas scii malmulte da lingvo sed tuj uzebla. Ĝuste en tio estas avantaĝo de Esperanto ke eblas komuniki plej elemente kun aliulo jam post lernado de iom pli ol 100 plej oftaj morfemoj. La lernanto kiu komencas lerni pro scivolemo (granda plimulto de duolinganoj), devas laŭeble urĝe konvinkiĝi ke ekzistas homoj alilande kun kiuj eblas komuniki. Sekve por tio estas bezonataj du kondiĉoj: kurso kiu baziĝas je minimumo de plej oftaj morfemoj kaj sistemo kontakti aliulojn (laŭeble lingve samnivelajn). La unua kondiĉo jam estas plenumita: ekzistas du kursoj bazitaj je studo de morfemofteco en E (learn.esperanto.com kaj Multlingva Akcelilo kiu troviĝas je la paĝaro de lernu.net/eo/instruado). La dua kondiĉo ne estas plenumita. Nur tre minimume en kelkaj kluboj kiel la londona, sed tion devus organizi tutmonde UEA kiu per la lokaj kluboj sekvos komencantojn en tiuj du lernlokoj kaj tuj ofertos al ili homajn kontaktojn aŭ mem helpus al tiuj komencantoj uzi la lingvon kun iu el la klubmembroj aŭ ligos ilin kun novlernantoj kiel en Londono. Oni devas atenti ke gejunuloj havas nenion komunan kun maljunuloj kaj ne atendu ke iu junulo restos en Esperanto-societo kun nuraj maljunuloj. Evoluigi tian socian reton signifus multjaran malfacilan organizan laboron. Kaj duolingo tute ne estas tio. Lerni per kurso kiu dum mallonga tempo ofertas lingvon kun du mil vortoj ne povas havi sukceson en senco de aliĝo de novaj membroj al iu asocio aŭ klubo kiel la artikolisto tre bone montris. Krome nepre necesas diskonigi la fakton ke tiuj du kursoj estas la nuraj konvenaj – la unua por plenkreskuloj, la dua por infanoj. La dua estas ankaŭ ege ilustrita kaj alloga.




Zlatko Tišljar

# INFORMOJ PRI NIA VERKISTINO SPOMENKA ŠTIMEC POST TERTREMO EN ZAGREBO



Ministerio pri kulturo de Respubliko Kroatio ĉiujare invitas verkistojn kandidatiĝi por subvencio, 3 aŭ 6 monata, kiu ebligu ke la koncerna verkisto dum tiuj monatoj okupiĝu pri verkado de nova libro kiu riĉigu kroatan literaturon. En la jaro 2019 mi kandidatiĝis kun la manuskripto „Hodler en Mostar“. Por kandidatiĝi mi devis aldoni 16 paĝojn de la koncerna kroatlingva teksto por montri ke la verkisto jam komencis labori kaj ke parto de la manuskripto jam ekzistas. Tiun prozon analizas literatura komisiono kaj decidas kiujn el multaj verkistoj kiuj kandidatas oni elektu kaj finance subtenu. (Mi ne rakontis ke mi publikigis similan libron en Esperanto. Ja en kandidatiga dokumento, por la konkurso tio ne gravas. Mi prezentis unuan ĉapitron el „Hodler en Mostar“ „La unua pozado“ en la kroata kaj en la postaj ĉapitroj mi prezentis la kroatan pentriston Jozo Kljakovic kiu estis studento de Hodler dum du jaroj en Ĝenevo. La teksto evidente plaĉis al la komisiono, kiu decidas kaj oni sendis al mi la kontrakton kaj post ĝi la unuan parton de la mono. Mi devas mem trovi eldoniston por la kroata verko.

Intertempe okazis kronviruso kaj tertremo kaj la Ministerio mesaĝis ke ĝi devos revizii ĉiujn kontraktojn jam subskribitajn por 2020 pro la nuna situacio (en Zagrebo damaĝitaj 26.000 konstruĵoj, amaso da preĝejoj, muzeoj. Probable nia Esperanto-ejo bone fartas ĉar mi havas nur telefonajn raportojn de studento kiu vizitis. Mi estas pli ol 70-jara kaj ne rajtas promeni, maljunuloj devas resti enfermitaj ĉar por ili estas aparte danĝere eliri. Kroatio havas tre severajn mezurojn kontraŭ kronviruso.

Do, kiam venis tertremo sur mia tablo estas diversaj dokumentoj pri Hector Hodler. Ekz. „L' Esperantisme“ kiun li eldonis kiel verketo en „Esperantia Biblioteko“ sen la jaro, sed verŝajne post 1908 ĉar li jam parolas en ĝi pri UEA. Mi loĝas en malnova domo, sur mansardo, 7 km aerlinie de la epicentro kaj mia strato nomata Nova ves apartenas al la plej damaĝitaj en la zagreba urbocentro. Mia verkado estas interrompita per najbaroj kiuj venas kompari miajn truojn en la muro kun la siaj kaj per la alveno de inĝeniero pri statiko sed ili konstatis ke ni rajtas pluloĝi en nia domo, sed ni devos atendi fajrobrigadistojn por malmunti niajn kamentubojn kiuj ricevis fendojn. 300 inĝenieroj nuntempe inspektas la domojn. 300 homoj devis el siaj domoj translokiĝi al studentaj hejmoj. Fajrobrigadanojn atendas eble 500 domoj. 1900 domoj estas neuzeblaj. Avantaĝon havas hospitaloj kaj bankoj. Nia domo ne estas prioritata.

Mi akcentas ke mi ne estas sciencisto nek dokumentisto, mi verkas fikcion inspiritan per Hector kaj Ferdinand Hodler. Kaj mi volas iom diskonigi ke Ferdinand Hodler havis filon kiu kreis por ni asocion UEA por kiu ankaŭ mi laboras, 100 jarojn post lia morto, la 31an de marto 2020! Malrekte: levi la prestiĝon de Esperanto kiel kultura ilo en mia lando. Eble nun pli klaras al vi kion mi nun faras.

Mi momente havas aldonan problemon: io misas pri mia okulo, sed oni nun nek povas eliri nek viziti hospitalojn, ĉiuj tro ŝarĝitaj. Do, mi atendu. Mi esperas povi fini tiun mian prozon.

Koran saluton,
Spomenka

# KION ĜI FARAS AL NI?

Kio okazas???? Kia estas tio viruso??
Ĝi ne atakas gravedulinojn.
La infanojn ĝi atakas plej malmulte.
Plej multe ĝi trafas neresponecajn homojn.
Ĝi pelas pli junajn zorgi pri maljunaj.
Ĝi pelas nin perforte ke ni ripozu, ĝi donas al ni pli longan ferion, mallongigitan labortempon.
Ĝi pelas nin pasigi pli da tempo kun la propraj infanoj.
Ĝi donas tempon al geedzoj, partneroj, najbaroj, pli bone interkonatiĝi, disponigas pli da tempo por la amo.
Ĝi instruas al ni pri prioritatoj kaj graveco zorgi pri la sano.
Ĝi pelas nin mem kirli la farunon kaj baki la panon.
Ĝi pelas nin ĉesi urĝi.
Ĝi pelas nin malpli polui la vivon.
Ĝi purigas la naturon.
Ĝi liberigas la stratojn kaj malpliigas la akcidentojn.
Ĝi elpelas homojn el kafejoj kaj monvetejoj.
Ĝi devigas nin esti pli humanaj.
Ĝi instruas ke ne povas helpi nin mono, vilao, aŭto, jakto ĉi tie aŭ aliloke, sed homo, vera, kuraĝa homo.
Ĝi instruas nin estimi verajn valorojn.
Ĝi instruas nin estimi ankaŭ fremdan vivon.
Ĝi metas nin en kaĝon dum bestoj estas ekstere.
Ĝi instruas al ni ke ne gravas nacio aŭ religio.
Ĝi instruas nin pri justeco kaj justa distribuo.
Ĝi instruas ke la vera valoro troviĝas en humaneco kaj organizita volontulado.
Ĝi forigas mensogajn maskojn de sur avidaj vizaĝoj.
Ĝi malpliigas prostitucion, kriminalon, monlavadon, malaltigas valoron de akcioj. Donas ŝancon ke la bazaj landoj redonu siajn ŝuldojn.
Ĝi instruas nin ke balkono kaj ĉirkaŭdoma tero havas ofte pli grandan valoron ol loĝejo kaj domo.
Ĝi instruas al ni ke ankaŭ en malliberejo oni povas esti feliĉa kaj libera.
Ĝi pelas nin strebi al scio, ke ni serĉu veran kaj ne malveran informon.
Ĝi instruas nin ke unu metro ĉirkaŭ ni estas NIA intimspaco, kaj ĉion post tio ni povas doni nur al tiuj al kiuj ni povas konfidi nian vivon.

Ĝi instruas al ni, ke la bontono havas sian grandan valoron kaj ke ne estas vana regulo ke suficas kapklini kiam ni iun salutas.
Ĝi instruas nin pli ofte lavi la manojn, sin kaj la psikon de la malpuraĵoj el la civilizo.
Ĝi instruas ke ni pli gardu la naturon, el kiu ni estas plektitaj.
Ĝi pelas registarojn kaj polikojn kunlabori.
Ĝi instruas nin kiam malbono estas ie malproksime de ni, ke efektive ĝi estas ege proksime.
Ĝi instruas nin fine aŭdi ke ĉiutage mortadis 8000 infanoj kaj ke por tio ni ne havis empation.
Ĝi liberigas la planedon de industriaj kaj homaj venenoj.
Ĝi instruas al ni esti homoj, bonaj homoj.
Homoj…
KIO ESTAS TIO???
Ĝi malfermis niajn okulojn kaj orelojn.
Imagu, kion tiu ĉi viruso faras al ni: ĝi instruas nin esti homoj, Esti tio kio ni estas!!

Nekonata aŭtoro

# POSTARTIKOLO

Ĉar mankas materialoj, ja ĉiuj E-aranĝoj en Eŭropo (krom optimisma German-pola kongreso) estas aŭ prokrastitaj aŭ nuligitaj, mi iom cerbumos pri la neevitabla sanekonomia krizo en la mondo kaj aparte en Zagrebo, kie krom la viruso ni havis sufiĉe fortan tertremon (5,5 Laŭ Richter) kiu damaĝis ĉirkaŭ 20.000 konstruaĵojn. La Covid 19 viruso kiu atakis la mondon kaj por kiu ankoraŭ ne estas vakcino, ŝajne estas esence pli danĝera ol aliaj gripvirusoj kiuj, kompreneble samtempe kunekzistas. En EU Italio kaj Hispanio tion pruvas. Do la kontraŭbatalo estas laŭeble malebligi ĉiujn kontaktojn inter homoj por ke ĝia disvastiĝado limiĝu. Nu, oni aŭdas ĉiam pli da medicinistoj kiuj kontraŭas tiun opinion dirante ke tio ne estas vera kaj pruvante per aliaj argumentoj. Nu por ni esperantistoj la metodoj aplikitaj (ĉiu lando fermis la landlimojn por homoj), tio estas detruiga. Neniu grupiĝo de homoj estas permesata kaj nia ekzisto dependas de internaciaj renkontiĝoj. La viruso ŝajne ne estas sezona, do, ke ĝi malaperus en somero, ĉar ja ĝi aperis ankaŭ en suda hemisfero kie nun pasis la somero kaj do oni esperas per izoleco iel haltigi ĝin. En malgrandaj landoj kiel Kroatio tio povus sukcesi, sed kio poste? Oni ne povas ekzisti sen vojaĝo de varoj kaj produktado? Do, oni devus malfermi la limojn kiam la viruso tuj revenos el landoj kiuj ankoraŭ ne venkis ĝin. Ekzistas ankaŭ strategioj ne tro zorgi pri ĝi. Ĝi mortigu maljunajn kaj malsanajn homojn kaj poste ĝi malaperos. Sed montriĝas ke ĉiam pli mortas ankaŭ mezaĝaj kaj eĉ junaj homoj. Konklude ia reveno al la mondo ĝis nun normala, ne okazos baldaŭ. Intertempe evoluas rapidege krizego ekonomia. En Kroatio dum du semajnoj perdis laborpostenojn 12.000 homoj kio pligrandigas la procenton de senlaboruloj al 27% de ĉiuj laborantoj. Ĉar la kroatia ekonomio vivis per pli ol 15% pro turismo, kiu evidente nuliĝos, tiel baldaŭ pli-malpli ĉiuj laboristoj en turismo senlaboriĝos. Ankoraŭ aldoniĝas la tertrema domaĝo en Zagrebo, kie oni devas trovi monon por sanigo de miloj da domoj, stariĝas la demando kiel kaj el kiu fonto? Ĝis nun la lumo venis el kelkaj aziaj landoj kiel Ĉinio kiu venkis la viruson kaj Tajvano kaj Sudkoreŭjo, kiuj ĝin ege limigis, sed ankaŭ Ĉinio ne povas nutri la tutan mondon. Kio okazos kiam la viruso disvastiĝos en Bharato?

Mi bedaŭrinde ne vidas sufiĉe rapidan ekonomian resaniĝon.
Kiu ĝis nun profitis de la viruso? Farmacia industrio kaj bankoj. La agrikulturo kaj produkta industrio daŭre troviĝas en ĉiam pli grandaj problemoj. Kio devus esti reformita en la mondo?

La kapitalismo en kiu profitas neproduktaj industrioj (kiel la farmacio kaj bankoj) devus finfine esti forpelita. Bankoj nun havas sufiĉajn monrezervojn kaj venos sennombraj postuloj pri kreditoj kaj la bankoj komencos iĝi sklavoposedantoj. Nome ĉiam pli da homoj kiuj ricevos kreditojn, ne povos redoni la ŝuldojn kaj petos novajn kreditojn, kiujn ili ankaŭ ne povos redoni… Pro bankrotaj malgrandaj ŝtatoj ankaŭ ili iĝos sklavoj. Krome, ne povante pagi grandajn elsperzojn por emeritoj (en Kroatio 40% de la tuta ŝtata budĝeto estas pensiaj elspezoj!) kiuj havos esence malgrandigitajn sumojn kaj iĝos ĉiam pli mizera vivo. Se polico havos malgrandigitajn salajrojn, ili ne povos prizorgi ĉiujn siajn taskojn kaj la kriminalo kreskos. Ĉiujn tiujn problemojn oni ne povos solvadi se por la solvoj necesoj komplikaj demokratiaj decidoj. Kio rezultos? La scenaro de Hungario. Transdonita la tuta povo al unu persono. Li povos decidadi kaj gvidi la landon per dekretoj. Kaj se ankaŭ tio ne solvos la problemon, sekvos militoj.

Nu kiajn perspektivojn havas Esperanto-movado. Nur tiun kiu permesis al ĝi travivi la grandajn krizojn de la 2 mondmilitoj. La homoj legos librojn kaj klopodos reteni sian esperantistecon en intimo. Kaj atendos pli bonajn tempojn. Nuntempe ekzistas interreto kaj la kontaktoj internaciaj ankoraŭ estas uzeblaj. Sed kiu pagos la servojn de guglo kiam neniu plu havos monon?

Post tiu ĉi krizego laŭ mi devos fali la kapitalismo kiu pro profito detruadis la mondan ĉirkaŭaĵon sen ia ajn reala bezono. Kion signifas mono kaj miliardoj? Punktoj en komputiloj. Kaj kion faru milarduloj per milardoj en la mondo en kiu oni ne plu produktas aferojn multekostegajn kiel la jaĥtoj, grandegaj konstruaĵoj, transportiloj kiel aviadiloj, kaj en kiu ne plu ekzistas funkciantaj aerhavenoj por ĝui en la turismo?

Zlatko Tišljar, la redaktoro

P.S. Dum mi vivos - kaj mi estas tre malsana, dependa de liverata oksigeno, mi redaktos ĉi tiun bultenon kaj sendos ĝin al vi dum funkcios retpoŝto senpaga.


## Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Pri la enhavo respondecas la aŭtoroj.
Finredaktita: la 31-an de marto 2020
Redaktoro: Zlatko Tišljar

En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljar, Povilas Jegorovas, Spomenka Štimec, Maja Cimerman-Sitar, Nekonata aŭtoro

Retpaĝo: http://www.europo.eu/eo/euhropa-bulteno

Eŭropa Esperanto-Unio
Por efika kaj maldiskriminacia komunikado
www.europo.eu